# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO



VOLUMO 4 N·RO 7
3·A JARKVARONO 1970

# S☆E☆L

Fondinto: "Avoto"
Kunfondinto: J.W. Leslie

Honoraj Prezidantoj:
"Avoto". Norman Booth.
Kolonelo D. H. Davis.
L. J. VanGulck.

Prezidanto: John Berggreen,
Brattvollveien 23 c,
Nordstrandhøgda, Norvegujo.

Sekretario: J. K. Hammer,
Taxusstraat 7, Zaandam,
Nederlando.

Kasisto: David H. Withey,
21 Brookfield Avenue,
Waterloo, Liverpool 22,
Britujo.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach
Nergt 37 c, N-6500 Kristiansund N, Norvegujo.

Esti redaktoro estas interesa - sed ankaŭ malfacila kaj streĉa - laboro. Kvarfoje en la jaro mi prenas la alvenitajn leterojn kaj manuskriptojn kaj gazetojn, kaj jen mi komencas per relegado kaj eltondado, prenas la skribmaŝinon kaj ekverkas. Ĉu mi povas trovi okulfrapajn bildojn? Legindajn artikolojn? Konvenan literaturon? Ĉu la fina rezulto fariĝos kiel la revo antaŭdiris?

En Norvegujo oni parolas pri la "gazetara morto". Jam multaj el la norvegaj gazetoj malaperis pro tiu. Kies estas la ŝuldo?

La norvega "gazetara morto" ne interesas vin. Sed ĝi ne estas nur nacia fenomeno. Ĝi ankaŭ minacas nin. Ĝi povas kapti nian modestan revuon!

Kies estus la ŝuldo?

La redaktoro nepre havas respondecon. Li kreas la gazeton, kaj se ĝi ne estas alloga kaj leginda kun ilustraĵoj k.t.p., ĝi maltrafas sian celon, kaj meritas morti.

La legantaro havas respondecon, se ĝi ne per kritiko kaj konsiloj montras la ĝustan vojon.

Kaj la abonantoj havas sian respondecon, ĉar sen mono eĉ plej bona gazeto ne povas eldoniĝi.

Legu la vortojn de la kasisto en tiu ĉi numero!

Mi provis kaj provos doni al la numerojn karakterizan trajton.


La temo de tiu ĉi numero estas mia propra lando. Ne - tio estas hazardaĵo, nur. La temo estas la lando de nia nova prezidanto:

John Berggreen.

Bonvenon al la laboro!

Hans Amund.

## LA LANDO




Norvegujo situas inter 57° 57′ 31″ kaj 71° 11′ 8″ norda latitudo kaj inter 4° 30′ 13″ kaj 31° 10′ 4″ orienta longitudo. La plej granda longeco, de Nordkapp ĝis Lindesnes estas ĉ. 1760 km, mezurita laŭ rekta linio, dum la plej granda larĝo de okcidento al orienta bordo estas ĉ. 430 km. Je la plej mallarĝa punkto, la lando estas nur 6 km larĝa.

Suden, okcidenten kaj norden, kaj parte ankaŭ orienten Norvegujo limas al la maro. La marbordo mezuras — sen fjordoj kaj golfoj — 3400 km. Se oni aldonas la fjordojn kaj golfojn, la tuta longeco estas ĉ. 20 000 km. La land-limo estas ĉ. 2570 km longa; la limo al Svedujo estas 1650 km, al Finnlando 724 km, kaj al Soveta Unio 196 km.

La tuta areo ampleksas 324 250 kvadratkilometrojn, sen la Svalbardinsularo.

**Tio, kio estas la plej granda en Norvegujo.**

| | |
|---|---|
| La insulo Hinnøy | 2198 km² |
| La lago Mjøsa | 366 km² |
| La rivero Glomma | 587 km |
| La monto Galdhøpiggen | 2469 m |
| La akvofalo Vettisfoss | 260 m |

# NIA NOVA PREZIDANTO



La Centra Komitato de Skolta Esperantista Ligo post la forpaso 2.1.1970 de Douglas Murphy elektis sinjoron John BERGGREEN, Oslo, Norvegujo, nova prezidanto de S.E.L. ek de 1.a de julio 1970

John Berggreen naskiĝis 25.10.09 en Sandefjord, Norvegujo.
Li fariĝis skolto en 1921, kaj dum 20 jaroj ĝis 1941 li trapasis ĉiujn rangojn, de patrolestro - trupestro - grupestro - Gilwell-ano - rovergvidanto.
Li lernis Esperanton 1932, fondis klubon en Sandefjord kaj fariĝis ĝia prezidanto, poste prezidis Klubon Esperantistan en Oslo dum 6 jaroj (ĝis marto 1970), estas Generala Sekretario de Norvega Esperantista Ligo depost 1968, plenumis la esperanto-ekzamenojn superan kaj instruistan.
John aliĝis al S.E.L. jam 9.6.32 kaj estis Nacia Reprezentanto de S.E.L. 1932-41. Li gvidis la SEL-kunvenojn dum la ĵamboreo en 1933 en Gödöllö, Hungarujo, kaj dum la UEA-kongresoj en Bern 1939 kaj Madrid 1968.
John estas kontorestro, sed ne perdis kontakton kun naturo kaj sporto. Ĉiujare li renovigas sian sportinsignon; la Oran Sportinsignon li akiris 1963, la Statueton 1968.


## *la prezidanto salutas:*

Karaj Skoltgefratoj!
Unue mi sincere dankas al Centra Komitato pro la honoro montrita al mi elektante min nova prezidanto de S.E.L.
Mi atentas, ke estas tre grava tasko, kaj mi promesas fari mian plej eblan por montri min inda al tiu fido.
Al ĉiuj anoj de SEL kaj ceteraj legantoj de nia organo La Skolta Mondo mi sendas korajn salutojn!

Nia Ligo portempe estas malgranda laŭ membronombro, sed <u>ne malforta</u> ĉar ni reprezentas treege gravan organizaĵon: La Esperantomovado bezonas novajn adeptojn - ĉefe inter la junularo - por renovigi sin kaj kreski, kaj la skoltoj - pli ol 20 milionoj el pli ol 100 landoj - nepre bezonas internacian lingvon. DO LA DU MOVADOJ DEVAS KUNLABORI EN MANIERO MULTE PLI INTIMA OL ĜIS NUN! Mi forte ŝatas substreki ĉi-tiun gravan taskon.

Aliaj flankoj de nia laboro estas Serĉi helpon de la esperantistoj en ĉiu loko kie tiuj troviĝas; aranĝi kursojn aŭ studrondojn por skoltoj; aliĝigi novajn membrojn al SEL grandamase; fondi novajn naciajn sekciojn en landoj, kie tiaj ne ekzistas; helpi ekonomie al nia organo kolektante novajn abonantojn kaj anoncojn. Ni ĉiuj uzu niajn fortojn por kreskigi kaj fortigi nian propran organizaĵon SEL. Speciale nun - unu jaro antaŭ la granda ĵamboreo en Japanujo - estas la ĝusta tempo propagandi por Esperanto inter la skoltoj. En 1972 ni havos la Internacian Jaron; do du eblecoj por enpenetri Esperanton en la vicojn de la geskoltoj!

Bonan laboron kaj sukceson mi deziras al vi ĉiuj!



# EL PRATEMPA GENTO

La prabovoj sur Dovremontoj estas jam famaj kaj ŝatataj objektoj de fotografoj, verkistoj kaj ordinaraj videmuloj.
Sed ja estas travivaĵo neordinara renkonti tian praan beston. Tute speciale al tiuj, kiuj vidas ilin la unuan fojon. La pratempa aspekto kune kun la trankvila, digna sinteno estas tiel nereala, ke oni sin sentas en fora tempo. Tiuj ĉi bestoj ne apartenas al nia tempo.
Plej ofte oni renkontas ilin en la Stølå-valo, kaj tie mi havis malofte vidaĵon. Mi vidis interbatalon de gvidobovoj de du gregoj. 17 bestoj sin paŝtis en la valofundo. Supre aperis tri, granda bovo kune kun du bovinoj. Tiuj nun proksimiĝis al la valofundo, kaj ekestis tuja maltrankvilo interne en la granda grego. Granda bovo, verŝajne la gvidanto, eliris kaj iris al la tri.
Paŝojn for la du bovoj haltis kaj kvazaŭ mezuris unu la alian. Post paŭzo ili cirkulis ĉirkaŭ unu la alian. Memorigis pri boksistoj dum la komenco de batalo. Ambaŭ bovoj estis belegas ekzempleroj; la dika pelto pendis kiel tuko ĝis la tero laŭ la flankoj. La fortikaj kapoj kun la du kornoj estis mallevitaj por atako, kaj el inter la dikaj lipoj aŭdiĝis nedifineblaj sonoj. La kapoj komencis svingi pendule, la piedoj frapis samtakte kun la ataksono. Subite, kiel laŭ signalo, ambaŭ reiris 8-10 metrojn. Kaj jen per tuta muskola forto kaj granda rapido ili kuris antaŭen kaj koliciis kapon al kapo, kun sono kiu eĥis en la valo. Estis terura kaj samtempe ekcitiga kaj komika vidaĵo. La longa hararo ja ĵetiĝis antaŭen, kaj dum momento mi povis vidi nur grandan amason da lano. Post nelonga proksimbatalo denove la interbatalantoj retiriĝis, kaj nova kolicio okazis. Tiel okazis fojon post fojo, ĉiam per samforta furiozo. Miraklo, ke la fruntoj povis toleri tion.
Post 5-6 minutoj unu el la bestoj komencis montri signojn de lacigo kaj ĉiam retiriĝis. Post la lasta furioza frontatako ĝi renversiĝis kaj devis forkuri.
Mi pli malfrue renkontis tiun sola ĉe roko centmetrojn pli alte en la valo.

El "I Dovregubbens rike" de Mathis Kværne.



Danlando.

Nia nova N. R. en Danlando, Asger Petersen, havis akcidenton. Pro tio la agado inter la danaj skoltoj ankoraŭ ne glate marŝas.
Tamen li jam sukcesis eldoni belan varb-broŝuron, kiun li disdonis dum du landaj ĵamboreoj.

Alĝerio.

La grupo de esperantistaj skoltoj en Annaba por kelkat tempo devis malhavi sian kursestron pro malsano.

Japanujo.

Nova kurso komenciĝis en Fukuoka, sub gvido de s-ro Sumitaka Umezu, kuracisto.
Nagajo E-societo komencis kurson en julio, interkonsente kun lokaj skoltgrupoj.
La skoltoj en Hirakata, sub gvido de s-ro K. Iŝii, bone progresas.
Oni nun klopodas, ke la japana sk. asocio aranĝu specialan esperantan tendaron dum la ĵamboreo.

Kanado.

Dum konferenco de la "Aventurskoltoj" en Weyburn, Saskatchewan, septembre kaj oktobre okazos ekspozicio pri S.E.L.; aranĝanto estas s-ro J. D. Boissonneault, 2020 Herman Ave., Saskatoon, Saskatchewan, Kanado.

Belgujo.

En aprilo okazis prelego pri nia Ligo en la urbo Charleroi. Kvankam la intersuloj estis nur malmultaj, ni poste ricevis plurajn mendojn de libroj kaj diskoj el la regiono de Charleroi.

Italujo.

Dum julio kaj aŭgusto en Italujo okazis pluraj labortendaroj, kiujn organizis Itala Esp.-Junularo kaj la Porpaca Kristana Movado.
oni riparis antikvan kastelon, pentris lernejon por nenormalaj infanoj, kaj faris aliajn similajn laborojn.
Bedaŭrinde la alvoko al SEl por kunlabori en ĉi tiu interesa projekto venis multe tro malfrue.

Nederlando.

En la gazetoj por skoltoj kaj por skoltestroj aperis artikoloj pri nia Ligo.
Ambaŭ artikoloj rikoltis plurajn mendojn.
Speciale en la nordaj provincoj de la lando la aktiveco de la lokaj esperanto-kluboj instigis multjan skoltojn kaj skoltestrojn al aktiva intereso por nia lingvo.

Koreujo.

Prof. Semanto T.Gim, Seoul Myoung College, Seoul, Koreujo, nun klopodas veki la intereson de la geskoltoj en sia lando por SEL.
En la urbo Gwangyu la studanto Ĵeong Ĵong Hju, Post Box 106, tre aktivas, i.a. per ekspozicio.

Eŭropo.


Dum la pasintaj monatoj multaj landoj en Eŭropo havis la plej belan someron, kiu okazis dum multaj jaroj. Kompreneble la varma, sunbrila vetero estis pli utila por tendumi kaj naĝi ol por studi. Sed certe, kiam la aŭtuno venis, la skoltoj denove interesiĝos por la Internacia Lingvo, por kompreno.

Korespondpetoj.

Ni petas al ĉiu NR, kiu legas la korespondpetojn en nia revuo, ke ili ne nur aperu en la Esperanta gazetaro, sed ankaŭ en ordinaraj skoltaj gazetoj naciaj.

Ĉiu anonco pri korespondo, en kiu Esperanto estas menciata, estas senpaga kaj valora reklamo por nia lingvo.

En tendaro.





-Ĉu li estas sanktulo?
-Ne. Li estas el Norvegujo.



# LA VIRINO KONTAŬ-TORENTA

Estis iam viro, kiu havis edzinon tiel malafablan kaj obstineman, ke ne estis facile vivi kune kun ŝi; la edzo - jen li absolute ne povis kunlabori kun ŝi; se li ion volis, ŝi ĉiam kontraŭis. Kaj jen estis dimanĉa mateno en la somero, kaj la geedzoj eliris por inspekti kiel statas la grenkampo.
Kiam ili venis al kampo trans la rivero, diris la viro: "Jes, jam ĝi estas matura; morgaŭ ni komencu falĉi."
"Jes, morgaŭ ni povas komenci la tondadon", diris la virino.
"Kion? Ĉu ni tondu? Ĉu ni ne povas falĉi?" diris la viro.
Ne, tondi la gregon ili devos, laŭ la opinio de la virino.
"Nenio estas malpli bona, ol malmulton scii," diris la viro; "sed vi certe perdis la malmultan scion, kiun vi iam havis. Ĉu vi iam vidis, ke iu ajn tondis sian grenkampon?", li diris.

"Malmulton mi scias, kaj malmulton mi emas·scii", diris la virino, "sed tion mi certe scias, ke la grenkampon ni devas tondi, ne falĉi", ŝi diris. Kaj pri tio ŝi ne volis diskuti. Tondota ĝi estis.
Kaj jen ili iris kaj diskutis kaj grumbladis, ĝis ili alvenis al la ponto trans la rivero, tuj apud profunda lageto.
"El pratempoj oni ja diras", diris la viro, "ke akraj iloj faras bonan laboron; sed tion ĉi mi kredas, ke estos mizera rikolta laboro, se oni tondos la grenon per lantondilo," li diris. "Ĉu ni vere ne rajtos falĉi la grenkampon?"
"Ne, ne - tondi, tondi, tondi!" kridiris la virino, eksaltis kaj tondis per la fingroj antaŭ la nazo de la viro. Sed dum la obstino ŝi ne gardis sin, kaj stumblis en trunkfino sur la ponto, kaj falis en la riveron.
"Malnova kutimo ne estas facile renversebla," pensis la viro, "sed estus strange, se ne mi pravus, ĉi tiun fojon."
Kaj jen li eniris la lageton, prenis la virinon per la hararo, tiel ke la kapo estis apenaŭ super la akvo. "Ĉu ni do falĉos la grenkampon," li diris.
"Tondu, tondu, tondu!" kridiris la virino.
"Mi vin instruos tondi," pensis la viro, kaj premis la virinon sub la akvon. Sed vane, ili nepre devus tondi, ŝi diris, dum li ŝin relevis.
"Mi ne povas kompreni alion, ol ke la virino frenezas," la viro diris al si mem. "Multaj frenezas, kaj ne scias tion, kaj multaj posedas saĝon, sed neniam uzas ĝin; mi tamen devas provi ankoraŭ unu fojon," li diris.
Sed li apenaŭ sukcesis premi ŝin sub la akvon, antaŭ ol ŝi metis sian manon supren kaj komencis tondi per la fingroj kvazaŭ per tondilo. Tiam la viro vere furiozis, kaj subprenis ŝin vere dum longa tempo. Subite la mano glitis sub la akvon, kaj la virino iĝis tiel peza, ke li devis lasi ŝin fali.
"Ĉu vi eĉ volas min tiri subakven al vi, trolo, tiam vi povas resti tie" diris la viro. Kaj la virino dronis.
Sed post kelka tempo la viro tamen pentis, kaj ŝajnis al li, ke estis tamen tro malbone, ke ŝi restu tie, kaj ne estu tombigata en kristana tero, kaj li iris laŭ la rivero kaj serĉis. Sed kvankam li tre diligente serĉadis, li ne trovis ŝin. Li petis helpon de la servistaro kaj de la najbaroj, kaj ili serĉis kaj serĉadis malsupren laŭ la rivero, la tuta aro, sed kiom bona estis la serĉado, ĝi estis vana.
"Ne," diris la viro, "tio ĉi ne utilas. Tiu ĉi virino estis neordinara virino," li diris. "Dum ŝi vivis, ŝi estis tiel obstinega, kaj ŝi nepre ne ŝanĝiĝis nun; ni devas serĉi supren laŭ la rivero, eble eĉ super la akvofalo; eble ŝi igis sin flui supren."
Kaj jes, ili supreniris, kaj ekserĉis iom super la akvofalo. Kaj jen, tie kuŝis la virino. La viro tute pravis.
Tio estis la virino kontraŭ-torenta!



«Det hadde vært lettere hvis vi hadde fått opp knuten.»

"Estus pli malfacile, se ni sukcesus malligi la nodon."





La aŭtuno alvenis, kaj ni tial tondas el nederlanda skoltrevuo

## Poppenkastpoppen maken

t.e. Kiel fari marionetojn.

Vi bezonas: botelojn, fortan kartonon, ĵurnalojn kaj tualetpaperon, farunan gluaĵon, kolorojn, penikon, feran fadenon.

1. Preparu la gluaĵon en granda sitelo. Poste vi povas transmeti iom en pli malgrandaj kaj pli konvenaj ujoj por uzo.
2. Faru tubon el kartono, kaj fiksu ĝin al botelo aŭ al bastono.
3. Faru bulojn el ĵurnaloj kaj fiksu ilin per gluanta paperbendo ĉ. la duono supra de la tubo formante kapon. Ne tro granda: Proks. 15 cm alta.
4. la kruda formo preta ni metas striojn da tualetpapero (kreppapero) kiujn ni antaŭe trenas tra la gluaĵo, ĉirkaŭ kaj al la kapo. Metu buŝon, nazon, orelojn kaj okulojn al la formo, ne tro malgrandaj, - faru ilin groteskaj por vidigi la karakteron de la pupo.




5. Faru plidikigon ĉirkaŭ la malsupra parto de la tubeto. La vestoj de la pupo pendos sur ĝi.

Kompreneble vi ankaŭ povas fari kapojn de bestoj - Mowgli kaj liaj amikoj!

Atentu la proporciojn. La okuloj iom pli alte ol la mezo de la kapo. Vidu la desegnaĵon.

Kiam la kapo estas preta, tuj koloriĝu ĝin. La koloroj bone miksiĝas kun la gluaĵo. Vi povas uzi ĉiajn koloraĵojn, sed akvokoloroj plej taŭgas, ĉar la puriĝo estas facila.




Por eventualaj brakoj faru tubetojn el kartono (por via dika fingro kaj ringfingro). Faru la manon kaj parton de la brako el metala drato, ĉirkaŭvolvu ĝin per papero kaj gluo, fiksu la tubetojn al ĝi. Poste vi fiksu ĝin al la vestaĵo.

Vi povas fari ĉion ĉi tion dum unu posttagmezo. Sed nun la kapo devas sekiĝi.

Belgujo.

La Unuiĝo de Internaciaj Organizaĵoj ekzistas 60 jarojn. Pro tio estis oficiala festo en salono de la urbdomo en Bruselo. Nia honora prezidanto J.van Gulck tie reprezentis nian Ligon.

Norvegujo.

La skoltinoj de la du skoltinaj asocioj (bluaj kaj brunaj) plenumas dumtempe tutan reorganizon de la laboroj. Anstataŭ la antaŭan dividon per tri, oni nun laboros estonte kun kvar aĝ-grupoj.

Pollando.

Polaj geskoltoj el la distrikto Kartozy estas invitataj partopreni kurson de Esperanto. Jam kelkaj anonciĝis. Bonvolu instigi ilin per sendado de korespondpetoj kaj informpetoj pri ilia agado. Skribu al ZHP, Kartuzy, strato Kosciuszki Pollando.




daŭrigo:

La vestaĵon ni faros en la sekvanta kunveno, aŭ hejme.

Por la teatro tuko aŭ litkovrilo sufiĉas, ekz. inter du seĝoj, en la aperturo de pordo k.t.p.

Eblecoj: rakontoj jam rakontitaj, fabeloj kiujn vi legis aŭ fantaziaĵoj laŭ la karaktero de la marionetoj. Kaj - kiel jam sugestite: Vi povas teatre montri la historion de Mowgli
ĉe la kampfajro
dum pluva tago en somerkampado
aŭ simple dum kunveno aŭ hejme ĉe la gepatroj.

# LA 4-a



La apuda kolor-lignogravuraĵo de la fama norvega artisto Edvard Munch (la bildo estis vendita por 94 765 norv. kr. je aŭkcio) havas du nomojn: "Du homoj" kaj "La soleculoj" Kaj tiu bildo igis min pensi pri la kvara leĝo.

La kvara Dia ordono estas: Respektu vian patron kaj vian patrinon, por ke estu al vi bone kaj longe daŭru via vivo sur la tero.


La kvara skolta leĝo estas: Skolto estas amiko al ĉiu, kaj frato al ĉiu alia skolto, ne konsiderante, al kiu lando, socia klaso, aŭ religio, apartenas tiu.

Ĉu vi komprenas? Du homoj - soleculoj. Jes, ili ekzistas. Virino aŭ viro - ies patrino aŭ patro, fratino aŭ frato, jes, via fratino kaj via frato. Kial ili estas soleculoj?

Nacieco, raso, religio. Estas unu forto, kiu disbatas ĉiujn ĉi tiujn barojn. La amo.
"Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia." Sankta Johano 13.35.

Pastro.

# 5000




aĉetis la lernolibron de S.E.L., "La Ĵamborea Lingvo".

Inter la milionoj da geskoltoj tio ja ne estas impona, sed similas al ŝport-fiŝkaptado, kiel nia ilustraĵo simbolas.

Tamen, se eĉ nur dekono - 500 - efektive ekuzus la lingvon praktike, dum skoltokunvenoj, por akiri skoltinsignojn internaciajn, per korespondo kaj al ĉiuspeca interŝanĝado tio estus la plej efika propagando inter skoltoj.

Ĉu vi proponis vian helpon al la loka skolta aŭ skoltina grupo?

Naciaj reprezentantoj:

Aŭstralio: S-ro S.H. Milligan, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills, 3127 Victoria. Telefono WF 7948.

Belgujo: S-ro Eddy Frederickx, Paasbloemstraat 31, B-2060 Merksem-Antwerpen. Poŝtĉekk. 9978.93. Tel. (03)454.76.

Brazilio: S-ro Euclides C. Soares, Av. Almirante Tamandare 979, Belem, Para.

Britujo: S-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs.

Danlando: S-ro Asger Petersen, Tårnvej 387 B, DK 2610 Rødovre.

Finnlando: Helpa NR: S-ro Timo Kaijanranta, Tienhaarankuja 5, Vuoksenniska, Imatra.

Francujo: Monsinjoro Patrick Truchemotte, 76 Rue Lombard, Bordeaux

Hispanujo: S-ro Pedro Marqueta, Fern el Catolico 32, 5°izqda, Zaragoza. Telefono 25 20 44.

Italujo: Prof. Franco Tulone, Via Frangipene 8, 92019 Sciacca, Agrigento. Telefono 21.198.

Japanujo: S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K. 16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.

Kanado: S-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest Ont..
Helpa N.R.: S-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb.

Kongo: S-ro Paul Deloin Nzemba-Paku, B.P. 198, Limete, Kinshasa.

Nederlando: S-ro J.K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam. Telefono (02980)-66931. Poŝtkonto 63 22 46.

Norvegujo: S-ro H.A. Rosbach, Nergt. 37c, N 6500 Kristiansund N. Tel (073)-77620. Poŝtkonto 8 03 04 13.

Portugalujo: S-ro J.P. de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-3°Dt°, Lisboa I

Usono: S-ro H. William Beare, 1007 Chicago Blvd., San Antonio, Texas 8 15 39.

David Withey: telefono WAT 2936.
L.J. van Gulck: telefono 03-3688.08. Poŝtkonto Belga Skolta Esperanto-Sekretariato 327460.

LA SKOLTA MONDO. Memoru la limtempon. La datoj estas 1-a de Februaro, 1-a de Majo, 1-a de Aŭgusto kaj 1-a de Novembro.

"ESTU PRETA"

# 1972 internacia jaro!




## Preparu vin per korespondo!


Se iu volas korespondi kun polaj knabinoj 16-17 jaraj, li (aŭ ŝi) skribu al prezidantino de Esperanto Rondo ĉe Ekonomia Liceo en Żukovo apud Gdansk. Adreso:
Kristina Ciskowska, Żukowo - L.E., pow. Kartozy, Pollando.


56-jara gimnazia profesoro, gvidanto de la JUNULARA SEKCIO de "BUDAPEST HOBBY CLUB" (kun 1340 gejunuloj) serĉas kontaktojn kun samfakaj kluboj, magazenoj, kaj gejunuloj hobiistoj el tuta mondo. La sekcio funkcias en la ĉefurba Kultur-domo.
Adreso: s-ro Endre Giday, BUDAPEST XI. FEHERVARI, ut 19. Hungarujo.

Kiuj deziras korespondi kun gejunuloj el 118 landoj, bonvolu skribi preslitere kun bonteknika foto 5x 7 cm al la adreso de "Fo-ki-ma", Budapest. XI.Puskas ter 13., ĉe onklo Pölöskey, Hungarujo. Ni dissendas la petojn al niaj delegitoj en 118 landoj.



Susan Pearsen, aĝo 15, volas korespondi kun geskoltoj en la okcidenta Eŭropo. Ŝi ankaŭ instruis sian fraton Mark, aĝo 12.
Ilia adreso: Susan kaj Marc Pearsen, 3. East Avenue, St. Kilda, Dunedin Nov-Zelando.





LERNU ESPERANTON!

REDAKCIO: N-6500 KRISTIANSUND

KUL